Sufiksoj : adi, igi, ĝi (§ 38).

VORTFARADO

Purigi, aŭdado, kuŝigi, riĉigi, riĉigi, parolado, pligrandigi, plibonigi, pliboniĝi, kontentigi, vekigi, junigi, juniĝi, plijuniĝi, plijuniĝi, maljuniĝi, plimaljuniĝi, devigi, glitado, fariĝi, dikiĝi, maldikiĝi, marŝadi.

EKZERCO

Vestu vin rapide kaj ne prenu tiun malbelan sed tiun ĉi novan ĉapelon! — Kiu el vi, junulinoj, iras kun mi en la magazenenon de novaĵoj? Ni ĉiuj irus volonte kun vi, sinjorino, se ni estus vestitaj, sed ĉar neniu el ni intencis eliri hodiaŭ, ni tute ne estas pretaj. — Mia patro devigas min purigi ĉiumatene miajn malpurajn ŝuojn. — Ni pagos ĉiun el tiuj silkaj kravatoj aparte. — Kiajn naztukojn vi volas aĉeti? Mi ilin prenos tiajn, kiaj ili estas.

LETERO

Tre kara kuzino,

Hieraŭ mi iris kun mia avino en la magazenenon de novaĵoj « Al la Malkareco ». Kia vastega bazaroj! Kiaj ĉarmaj objektoj en ĉiu angulo! Ion pli belan mi neniam vidis. Jen estas la silkaj jupoj, jen la veluraj manteloj, pli malproksimo kuŝas delikataj punktoj aŭ diverskoloraj ŝtofoj, rubandoj, tuko kaj kravatoj. Sur la unua etaĝo ni trovas la tolaĵojn: ĉemizojn, kolumojn, manumojn k. t. p. La ĉapelaro estas lokita pli alte kun la luksaj piedvestoj, la falsa juvelaro kaj la blankaj elefantostatoj. En la keletaĝo troviĝas ne bareloj da vino, sed kulreĵaj fornoj, domaj iloj ĉiuspecaj kaj ludiloj por infanoj. Vi trovas ĉion, nenio mankas en tiuj oportunaj berlinaj magazenoj. Malgraŭ tio mi preferas ankoraŭ la malgrandajn butikojn de nia provinca urbo kaj mi esperas, ke mi baldaŭ havos la plezuron, ilin viziti en via aminda kaj agrabla societo. Fartu bone! Amikaĵojn mi sendas al viaj gefratoj kaj al vi, karulino, multajn kisojn.

Via tutkore sindona kuzino.

Sofio N.

En Berlino, la unuan de marto 1902.

Gramatiko : §§ 27, 28.

Sufiksoj : ema, ebla, inda (§ 38).

VORTFARADO

Lernema, legebla, punebla, kalkulebla, laborema, indulgema, forgesema, forgesinda, neforgesebla, leginda, puninda, kalkulinda.

EKZERCO

Kiam venos via aminda fratino? Si ĵus venis tien ĉi. — Tiu ĉi lernanto estas diligenta kaj prudenta, sed ne sufiĉe laborema : liaj skribaĵoj ĉiam estas tiel malbone skribitaj, ke ili ne estas legeblaj de liaj instruistoj, kiuj ĉiutage, sed vane, lin punas. — Kiam mi ricevis vian leteron, mi skribis al via amiko, sed li ne ankoraŭ respondis. — Kial vi ne iros morgaŭ kun ni en teatron? Tial ke mi neniam iras tien.

LETERO

Stokholmo, en la kvina tago de marto 1902.

Vi opinias eble, mia kara Paŭlo, ke mi estas tre maldiligenta, tial ke ĝis nun, mi ne respondis vian amindan leteron de l'antaŭa jaro. Malfeliĉe via adreso de mi estis forgesita kaj mi ne povis trovi ĝin en la provinca adresaro. Hieraŭ, okaze, ia amiko, kiu ĵus venis Stokholmon kaj vin konas, parolis kun mi pri vi kaj donis al mi la necesan sciigon. Plezure mi aŭskultis lian rakontadon, ĉar mi sciigis tiel, ke vi ĉiam estas la junulo laborema, saĝa kaj prudenta, kun kiu mi dum preskaŭ du tutaj jaroj tiel multe laboradis, kiel eble estas. Ĉu vi memoras iafaj niajn ĉarmajn babiladojn post la vespermanĝo? Vi pli amis la versaĵojn de la nova verkistaro, mi preferis la librojn de la poetoj, kiuj vivis en la antikvaj tempoj. Cetere ĉie ni trovis se ne grandajn kaj laŭdindajn lecionojn, almenaŭ tiun amon al la beleco, kiu estas la afero plej grava ĉe la verkistoj. Tiu amo ankaŭ estas tio, kio nin unuigis ĉe nia unua kunveno. Mi tre esperas, ke mi povos baldaŭ viziti vin, kaj en tia agraba espero mi tutkore premas viajn manojn.

Via ĉiam sindonema amiko.

Henriko L.

Gramatiko : §§ 34, 35, 36.

Prefiksoj : dis, ek re (§ 37).

VORTFARADO

Dissendi, ekkanti, rediri, resendi, disĵeti, ekbruligi, disiri, disdoni (disdonaci), refari, ekridi, ekplori.

EKZERCO

Via onklino venu tuj, mi petas, ĉar mi bezonas paroli kun ŝi hodiaŭ. — Konvenas, ke la pastro elparolu korekte. — Diru al viaj lernantoj, ke ili reportu en la lernejon ĉiujn librojn, kiujn ni bezonas. — Se niaj donacoj estas tro belaj, mi demandas min, ĉu niaj amikoj ne rifuzos ilin. — Tuj kiam la fratino vidis sian fraton, ŝi ekplendis, ke li, anstataŭ skribi ĉiusemajne, nur malofte donis signon de vivo; sed li respondis, ke ŝi estas malprava.

DIALOGO

Sofio. — Ernesto. — Nikolao.

S. Bonan tagon, sinjoro, kiel vi fartas?

E. Tre bone, mi dankas (aŭ dankon), kaj vi, sinjorino?

S. Bone, mi neniam fartis pli bone ol de kelka tempo.

E. Kiu venas tie? Ĉu ne estas nia amiko Nikolao la instruisto?

S. Jes, estas li. Mi lasas vin. Fartu bone! (*Ŝi deiras*).

E. Bonvenon al vi, amiko. Kiel vi fartas nun? Ĉu via familio estas en bona farto?

N. Mia edzino ĉiam estas sana, sed unu el miaj infanoj havas mienon tre malbonan, ĝi ne havas plu apetiton kaj ĉiam plendas pri kapdoloroj.

E. Eble tio ĉi vonas nur el tro granda kresko. La kreskado tre lacigas la infanojn.

N. Tion ĉi vi diras por trankviligi min, sed ĉar vi mem estas patro, vi certe komprenas mian timon.

E. Sendube... Nun, adiaŭ. Faru mil amikaĵojn al via frato, je mia nomo. Salutu vian patron de mia parto kaj prezentu mian respektan submetiĝon al via edzino.

N. Certe, mi ĝin faros. De via flanko ne forgesu revoki min al la memoro de viaj gepatroj. Ĝis la revido!

Lad L. DE BEAUFONT.

Gramatiko : §§ 22. 25.

Afiksoj : ĉj, nj (§ 38).

VORTFARADO

Fulmotondro, pafarko, fervojo, akvofalo, duoninsulo, ĉielarko, bonodora, sunkuŝiĝo, sunleviĝo, tutmonda, malumo, rapidi, kreanto, kreinto, savanto, savinto, savonto.

Monteto, ventego, insulano, kreskaĵo, profundegaĵo, ebenaĵo, profundeco, leonido, anserido, insularo, vagonaro, glaciejo, herbejo, neĝero, universestro, parfumisto, blovilo, cigaredingo, ĉerizujo, drinkulo, drinkado, sekigi, sekigi, babilema, fluidigebla, dezirinda.

EKZERCO

Revidinte sian patrinon post longa malsano, la junulo estas ekkriinta (aŭ, pli bone : ekkriis), ke tiu vido lin resanigos. — Ne salutita (aŭ : salutite) de siaj amikinoj, la kuracistedzino estis elirinta el nia domo, kiam mi alvenis. — « Antaŭ ol skribi, vi estus devinta paroli kun ŝi pri tiu afero. » « Sed dube, patro, kaj efektive mi estis intencinta diri al ŝi ĉion buŝe, sed ĉar ŝi estis foririnta, mi necese skribis, por ke ŝi sciiĝu mian volon. »

DIALOGO

Sonjo (aŭ Sofnjo). — Erĉjo (aŭ Erneĉjo).

— Niĉjo (aŭ Nikolĉjo, Nikoĉjo, Nikĉjo).

E. Kian temperaturon vi preferas, Sonjo, la sekan aŭ la malsekan, la varmegan aŭ la glacian, unuvorte kian sezonon?

S. Senŝerce mi diros al via grafa Moŝto, ke el ĉiuj sezonoj de l'jaro mi preferas la printempon kaj la majan monaton. En majo la arboj malfermas siajn burĝonojn kaj kovras sin per folioj kaj floroj. Ĉiuj kreskaĵoj parfumas la aeron.

E. Kontraŭe mi preferas la dormadon de l'naturu, la vintron. Estas por mi plezuro, rigardi la kamparon kovritan per ĝia mantelo de brilega neĝo. Se la pluvo falas, mi restas hejme, sidante apud la fajro kaj fumante bonan cigaron aŭ bonegan pipon.

S. Kaj vi, Niĉjo? nenion vi diras : Kian tempon de jaro vi preferas?

N. Ho! mi havas guston tute diferencon de l'via. Dum la printempo oni scias neniam, ĉu oni devas preni la pluvombrelon aŭ la bastonon. Mi

preferas la aŭtunon. Dum la aŭtuno la temperaturo estas pli agrabla ol en la somero : la marŝo estas plezuro.

S. Vi estas prava, Niĉjo. Rimarku, ke se ni komparas la sezonojn kun la vivo de l'homo, ni trovos, ke la printempo respondas al la infaneco, la somero al la aĝo de l'pasioj; la aŭtuno figuras la maturecon en la vivo kaj la vintro la maljunecon.

L'au L. DE BEAUFONT.

L'Espero.

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Perflugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko!

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion :
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la Esperantoj.

L. ZAMENHOF.

Kanteto de Ofelio (Hamleto, IV).

Mia kara, mia belo
Estis brava juna Dano,
Portis plumojn sur ĉapelo
Kaj bastonon en la mano.

Vane estas la espero,
Li jam mortis ne revenas!
Lian kapon kovras tero
La piedojn ŝtono tenas.

Ĉemizeton oni metis
Sur karulon inter ploroj;
Sur la tombon oni ĵetis
Multon el la kampaj floroj.

Trad. L. ZAMENHOF.

VOCABULARIO

Aĉeti	<i>comprar</i>	bani	<i>bañar</i>
adiaŭ	<i>adiós</i>	barbo	<i>barba (pelo)</i>
adreso	<i>dirección</i>	barelo	<i>barril; tonel</i>
aero	<i>aire</i>	bastono	<i>bastón</i>
afabla	<i>amable</i>	bazaro	<i>bazar</i>
afero	<i>asunto</i>	bela	<i>hermoso; bello</i>
agrabla	<i>agradable</i>	bezoni	{ <i>necesitar; tener</i>
aĝo	<i>edad</i>		{ <i>necesidad de</i>
akcepti	<i>aceptar</i>	biblioteko	<i>biblioteca</i>
akra	<i>agudo, cortante</i>	biero	<i>cerveza</i>
akvo	<i>agua</i>	birdo	<i>pájaro; ave</i>
al	<i>á; hacia</i>	blanka	<i>blanco</i>
almenaŭ	{ <i>al menos; á lo</i>	blinda	<i>ciego</i>
	{ <i>menos</i>	blovi	<i>soplar</i>
alta	<i>alto (no la voz militar)</i>	bo-	<i>véase Gramática § 37</i>
ami	<i>amar</i>	bofrato	<i>cuñado</i>
amiko	<i>ámigo</i>	bombono	<i>bonbón</i>
aminda	<i>digno de ser amado</i>	botelo	<i>botella</i>
angulo	<i>ángulo; rincón</i>	bovo	<i>buey</i>
ankaŭ	<i>tambièn</i>	brako	<i>brazo</i>
ankoraŭ	<i>todavía; aun</i>	brava	<i>bravo</i>
ansero	<i>oca; ganso</i>	brili	<i>brillar; resplandecer</i>
anstataŭ	<i>en vez de</i>	bruli	<i>quemar</i>
antaŭ	<i>antes; delante</i>	brusto	<i>pecho</i>
antikva	<i>antiguo</i>	bulko	<i>panecillo</i>
aparte	<i>oparte</i>		{ <i>yema, brote de</i>
aparteni	<i>pertenecer</i>	burgono	{ <i>la planta; bo-</i>
apenaŭ	<i>apenas</i>		{ <i>tón sobre la</i>
apetito	<i>apetito</i>		{ <i>piel es akneo</i>
apud	<i>junto á; cerca de</i>	buŝo	<i>boca</i>
arbo	<i>árbol</i>	butero	<i>manteca de vaca</i>
arĝento	<i>plata</i>	butiko	<i>tienda</i>
arko	<i>arco (geometria)</i>	Cento	<i>centena</i>
aŭ	<i>o</i>	certa	<i>cierto</i>
aŭdi	<i>oír</i>	cigaredo	<i>cigarrillo</i>
aŭskulti	<i>escuchar</i>	cigaro	<i>cigarro</i>
aŭtuno	<i>otoño</i>	Ĉambro	<i>habitación</i>
avara	<i>avaro</i>	ĉapelo	<i>sombrero</i>
avo	<i>abuelo</i>	ĉar	<i>porque; puesto que</i>
Babili	<i>charlar</i>	ĉarma	<i>encantador</i>
balai	<i>barrer</i>	ĉe	<i>en, en casa de</i>
baldaŭ	<i>pronto</i>	ĉemizo	<i>camisa</i>
balkono	<i>balcón</i>	ĉerizo	<i>cereza</i>

ĉiam	<i>siempre</i>	edzo	<i>marido, esposo</i>
ĉielo	<i>cielo</i>	efektiva	<i>efectivo, real</i>
ĉirkaŭ	<i>alrededor de</i>	ek-	<i>v. gram. § 37</i>
ĉokolado	<i>chocolate</i>	ekbruligi	<i>encender</i>
	<i>(particula inte-</i>	ekkrii	<i>exclamare</i>
ĉu	<i>rrogativa, si</i>	ekster	<i>(en el exterior;</i>
	<i>(condicional</i>	ekzercaro	<i>fuera de</i>
	<i>dubitativa).</i>	ekzerco	<i>colección de</i>
Danki	<i>dar gracias</i>		<i>ejercicios</i>
dato	<i>fecha</i>		<i>ejercicio (gram.)</i>
de	<i>de</i>	el	<i>de; indica ex-</i>
dekstra	<i>derecho, -a, diestro, -a</i>	el	<i>tracción, idea</i>
delikata	<i>{ delicado (no de</i>		<i>de dentro á</i>
	<i>salud)</i>		<i>fuera</i>
demandi	<i>preguntar</i>	elefanto	<i>elefante</i>
densa	<i>denso; espeso</i>	eliri	<i>salir</i>
dento	<i>diente</i>	en	<i>(en; dentro;</i>
devi	<i>deber</i>	en	<i>idea de fuera</i>
deziri	<i>desear</i>	enui	<i>á dentro</i>
difekti	<i>{ deteriorar; es-</i>	esperi	<i>fastidiarse; mo-</i>
	<i>tropear</i>		<i>lestarse</i>
diferenci	<i>diferenciar</i>	esti	<i>esperar, tener</i>
dika	<i>grueso</i>	estimi	<i>esperanza</i>
diligenta	<i>diligente</i>	estingi	<i>ser</i>
Dio	<i>Dios</i>	etaĝo	<i>estimar</i>
diri	<i>decir</i>	eterna	<i>apagar; extinguir</i>
dis-	<i>v. gram. § 37</i>	Facila	<i>piso</i>
disĵeti	<i>{ esparcir; des-</i>	fajro	<i>eterno</i>
	<i>parramar</i>	falĉi	<i>fácil</i>
diversa	<i>vario : diverso</i>	faldi	<i>fuego</i>
dividi	<i>dividir</i>	fali	<i>guadañar</i>
do	<i>pues</i>	falsa	<i>plegar</i>
dolĉa	<i>dulce</i>	familio	<i>caer</i>
dolori	<i>causar dolor á</i>	fari	<i>falso</i>
domo	<i>casa</i>	fariĝi	<i>familia</i>
donaci	<i>regalar</i>		<i>hacer</i>
doni	<i>dar</i>		<i>{ pasar de un</i>
dormado	<i>sueño largo</i>		<i>estado ó ma-</i>
dormi	<i>dormir</i>		<i>nera de ser á</i>
dorso	<i>espalda; dorso</i>		<i>otro</i>
dramo	<i>drama</i>	farti	<i>{ estar de salud;</i>
drinki	<i>beber con exceso</i>	febzo	<i>pasar de id</i>
dubi	<i>dudar</i>	feliĉa	<i>fiebre</i>
dum	<i>mientras que</i>	fenestro	<i>feliz</i>
Ebena	<i>igual; liso; llano</i>	fermi	<i>ventana</i>
ebla	<i>posible</i>	fero	<i>cerrar (no con llave)</i>
eĉ	<i>así mismo, hasta</i>		<i>hierro</i>
	<i>(ponderativo)</i>		

fervoro	<i>fervor; celo</i>	haro	<i>cabello; pelo</i>
fianĉo	<i>novio; prometido</i>	haŭto	<i>piel</i>
figuri	<i>figurar</i>	havi	<i>tener</i>
filo	<i>hijo</i>	hejme	{ <i>la casa; el ho-</i>
fingro	<i>dedo</i>	helpi	{ <i>gar domestico</i>
fiso	<i>pez; pescado</i>	herbo	<i>ayudar</i>
flari	<i>oler; olfatear</i>	hierba	<i>yerba</i>
floro	<i>flor</i>	ayer	<i>ayer</i>
flugi	<i>volar</i>	ho!	<i>¡oh!</i>
fluida	<i>líquido</i>	hodiaŭ	<i>hoy</i>
fojo	<i>vez</i>	homo	<i>hombre (especie)</i>
folio	<i>hoja</i>	horloĝo	<i>reloj</i>
for	<i>fuera; lejos (interj.)</i>	horo	<i>hora</i>
forgesi	<i>olvidar</i>	humila	<i>humilde</i>
forko	<i>tenedor</i>	hundo	<i>perro</i>
forno	<i>horno</i>	Ilo	<i>instrumento</i>
forta	<i>fuerte</i>	inda	<i>digno de</i>
fortika	<i>robusto</i>	indulgi	<i>ser indulgente</i>
frato	<i>hermano</i>	infano	<i>niño</i>
fraŭlo	<i>soltero</i>	instrui	<i>enseñar; instruir</i>
frue	<i>temprano</i>	insulo	<i>isla</i>
frukto	<i>fruto</i>	intenci	{ <i>intentar; tener</i>
frunto	<i>frente</i>	inter	{ <i>intención de</i>
fulmo	<i>relámpago</i>	interne	<i>entre</i>
fumi	<i>fumar</i>	interne	<i>en el interior; dentro</i>
Gaja	<i>alegre</i>	iri	<i>ir</i>
ge-	<i>v. gram. § 37</i>	Jam	<i>ya</i>
gefratoj	<i>hermano y hermana</i>	ĵaro	<i>año</i>
genuo	<i>rodilla</i>	je	<i>preposición general</i>
glacio	<i>hielo</i>	jen	<i>he aquí</i>
gladi	<i>planchar</i>	jes	<i>si</i>
glaso	<i>vaso</i>	juĝi	<i>juzgar</i>
glavo	<i>espada</i>	ĵuna	<i>joven</i>
gliti	<i>resbalar</i>	ĵupo	<i>faldas</i>
grafo	<i>conde</i>	ĵuvelo	<i>joya</i>
granda	<i>grande</i>	Ĵaŭdo	<i>jueves</i>
grava	<i>importante</i>	ĵeti	<i>arrojar; tirar</i>
greno	<i>trigo</i>	ĵus	<i>ha poco; acabar de</i>
gusto	<i>gusto</i>	Kafo	<i>café</i>
gustumi	<i>gustar, saborear</i>	kaj	<i>y</i>
Gardeno	<i>jardín</i>	kajero	<i>cuaderno</i>
ĝis	<i>hasta</i>	kaldrono	<i>caldera</i>
Hajlo	<i>granizo</i>	kalkuli	<i>contar (nonarrar)</i>
haki	<i>hender con hacha</i>	kameno	<i>chimenea</i>
hakilo	<i>hacha</i>	kampo	<i>campo</i>
halti	<i>pararse</i>	kandelo	<i>buja</i>
harmonio	<i>harmonia</i>	kanti	<i>cantar</i>

kapabla	<i>capaz</i>	kosti	<i>costar</i>
kapo	<i>cabeza</i>	kovri	<i>cubrir</i>
kara	<i>caro, querido</i>	krajono	<i>lápiz</i>
karbo	<i>carbón</i>	kravato	<i>corbata</i>
kaserolo	<i>cacerola; cazuela</i>	kredi	<i>créer</i>
kastelo	<i>castillo</i>	krei	<i>crear</i>
kaŝi	<i>esconder, ocultar</i>	kreski	<i>crecer</i>
kato	<i>gato</i>	krii	<i>gritar</i>
ke	<i>que</i>	kruro	<i>pierna</i>
kelo	<i>sótano</i>	k.t.p.(kajtiel plu) etcétera	
kesto	<i>caja</i>	kudri	<i>coser</i>
kia	<i>cual</i>	kuiiri	<i>cocer</i>
kial	<i>por qué?</i>	kuko	<i>torta, pastel</i>
kiam	<i>cuando</i>	kulero	<i>cuchara</i>
kie	<i>en donde; donde</i>	kun	<i>con</i>
kiel	<i>como</i>	kuraci	<i>curar enfermedades</i>
kies	<i>{ de quien; cuyo,</i>	kuracisto	<i>médico</i>
kió	<i>{ -a</i>	kuri	<i>correr</i>
kiom	<i>que (cosa)</i>	kurteno	<i>cortina</i>
kiso	<i>cuanto</i>	kuseno	<i>almohada</i>
kiu	<i>beso</i>	kuŝi	<i>{ estar acostado,</i>
klara	<i>quien, que, cual</i>	kuŝiĝi	<i>{ tendido-</i>
knabo	<i>claro</i>	kuzo	<i>acostarse</i>
koko	<i>muchacho</i>	Labori	<i>primero</i>
kolekti	<i>gallo</i>	laca	<i>trabajar</i>
koleri	<i>coleccionar; reunir</i>	lako	<i>cansado</i>
kolo	<i>{ encolerizarse;</i>	lampo	<i>leche</i>
koloro	<i>{ incomodarse</i>	lando	<i>lámpara</i>
kolumo	<i>cuello</i>	lango	<i>pais</i>
kombi	<i>color</i>	lanterno	<i>lengua(órgano)</i>
kompari	<i>collar, cuello</i>	larĝa	<i>farol, linterna</i>
kompreni	<i>{ de camisa</i>	laringo	<i>ancho</i>
konfesi	<i>peinar</i>	lasi	<i>laringe</i>
koni	<i>comparar</i>	lasta	<i>dejar</i>
konsisti (el)	<i>{ comprender;</i>	laŭ	<i>último</i>
kontenta	<i>{ entender</i>	laŭdi	<i>según</i>
kontraŭ	<i>confesar</i>	laŭte	<i>alabar</i>
konveni	<i>conocer</i>	lavi	<i>en voz alta</i>
korekti	<i>{ consistir en;</i>	leciono	<i>lavar</i>
koro	<i>{ componerse de</i>	legado	<i>lección</i>
korpo	<i>contento</i>	legi	<i>lectura</i>
korto	<i>contra</i>	legomo	<i>leer</i>
	<i>convenir</i>	leono	<i>legumbre</i>
	<i>corregir</i>	lerni	<i>león</i>
	<i>corazón</i>	lerta	<i>aprender; estudiar</i>
	<i>cuerpo</i>	letero	<i>hábil; listo</i>
	<i>corte, patio</i>		<i>carta</i>

levi	levantar; alzar	Mošto	titulo de cortesia
libro	libro	movi	mover
ligno	leña; madera	multe	mucho
lingvo	lengua (lenguaje)	muŝo	mosca
lipo	labio	muta	mudo
litero	letra del alfabeto	Naĝi	nadar
lito	cama; lecho	najbaro	vecino
logi	atraer, cebar	naski	dar á luz; parir
loĝi	residir; habitar	naskiĝo	nacimiento
loko	sitio; puesto	naturu	naturaleza
longa	largo	nazo	nariz
ludi	{ jugar; tocar	ne	no
	{ instrumentos	necesa	necesario
lukso	lujo	neĝo	nieve
lumi	lucir	nek... nek	ni... ni
luno	luna (la)	nepo	nieto
Magazeno	almacén	nevo	sobrino
mal	v. gram. § 37	nigra	negro
malavara	generoso; dadivoso	nokto	noche
malgraŭ	{ á pesar de; no	nombro	{ número (no ci-
	{ obstante		{ fra, ni de pe-
	{ comer (sentido		{ riódico)
	{ general)	nomo	nombre
manĝi	faltar	nova	nuevo
manki	mano	nun	ahora
mano	mano	nur	solamente; no más que
mantelo	manto; capa	nutri	nutrir
maro	mar	Obei	obedecer
marŝi	andar, marchar	objekto	objeto
mateno	mañana	odori	exhalar olor
matura	maduro	ofendi	ofender
meblo	mueble	ofte	á menudo
mem	mismo	okaze	{ accidental-
membro	miembro		{ mente; ca-
memori	acordarse		{ sualmente
meti	poner; colocar	okulo	ojo
mezo	medio	oleo	accite
mieno	semblante	ombrello	quitasol, paraguas
militi	guerrcar	oni	se
minuto	minuto	onklo	tio
monato	mes	opinii	opinar, pensar
mondo	mundo	oportuna	cómodo, -a
mono	dinero	ordo	orden
monto	monte; montaña	ordoni	ordenar
	{ mañana (dia	orelo	oreja
	{ siguiente al de	osto	hueso
morgaŭ	{ hoy)	ovo	huevo
morti	morir		

Paco	<i>paz</i>	prava	<i>que tiene razón</i>
pafi	<i>disparar (arma)</i>	precipe	<i>sobre todo</i>
pagi	<i>pagar</i>	preferi	<i>preferir</i>
paĝo	<i>página</i>	preĝi	<i>orar, rezar</i>
palpi	<i>palpar, tocar</i>	premi	<i>presurar</i>
pano	<i>pan</i>	preni	<i>tomar</i>
papero	<i>papel</i>	preskaŭ	<i>casi</i>
pardoni	<i>perdonar</i>	preta	{ <i>pronto, dis-</i>
parenco	<i>pariente</i>	prezenti	{ <i>puesto, listo</i>
parfumo	<i>perfume</i>	prezenti	<i>ofrecer, presentar</i>
parkere	<i>de memoria</i>	pri	<i>sobre (atento á)</i>
paroli	<i>hablar</i>	printempo	<i>primavera</i>
parto	<i>parte</i>	pro	<i>por (á causa de)</i>
pasio	<i>pasión</i>	profunda	<i>profundo, -a</i>
pastro	<i>sacerdote</i>	proksima	<i>próximo, -a</i>
patro	<i>padre</i>	promesi	<i>prometer</i>
pensi	<i>pensar</i>	provi	<i>probar</i>
per	<i>por (medio de), con</i>	provinco	<i>provincia</i>
perdi	<i>perder</i>	prudenta	<i>prudente</i>
permesi	<i>permitir</i>	prunti	<i>prestar</i>
peti	<i>pedir, rogar</i>	puni	<i>castigar</i>
piedo	<i>pie</i>	punkto	<i>punto</i>
pinglo	<i>alfiler</i>	punto	<i>puntilla, encaje</i>
pipo	<i>pipa</i>	pupo	<i>muñeca (juguete)</i>
pipro	<i>pimienta</i>	pura	<i>limpio, -a</i>
plaĉi	<i>placer (satisfacer)</i>	Radiko	<i>raiz</i>
plado	<i>plato llano</i>	rakonti	<i>contar, narrar</i>
planko	<i>suelo</i>	rapida	<i>rápido, -a</i>
plata	<i>plano, -a</i>	re-	<i>v. gram. § 37</i>
plej	<i>el más</i>	rekompensi	{ <i>premiar, re-</i>
plena	<i>lleno, -a</i>	rekompensi	{ <i>compensar</i>
plendi	<i>quejarse, lamentarse</i>	rekta	<i>recto, -a</i>
plezuro	<i>placer</i>	renversi	{ <i>volear, voltear,</i>
pli	<i>más</i>	renversi	{ <i>volver</i>
plori	<i>llorar</i>	respekto	<i>respeto</i>
plu	<i>más, ya, mas alli</i>	respondi	<i>responder</i>
plumo	<i>pluma</i>	resti	<i>quedar, permanecer</i>
pluvo	<i>lluvia</i>	ricevi	<i>recibir, obtener</i>
po	<i>á razon de</i>	riĉa	<i>rico, -a</i>
poeto	<i>poeta</i>	ridi	<i>reir</i>
popolo	<i>pueblo</i>	rifuzi	<i>rehusar</i>
por	<i>para</i>	rigardi	<i>mirar</i>
pordo	<i>puerta</i>	rimarki	<i>anotar, reparar</i>
porti	<i>llevar</i>	ripeti	<i>repetir</i>
post	<i>después</i>	rivero	<i>rio</i>
poŝto	<i>la posta, correo</i>	rozo	<i>rosa</i>
povi	<i>poder</i>	rubando	<i>cinta</i>

ruĝa	rojo, -a	sub	bajo
Sablo	arena	subita	subito, -a
saĝo	razón	subskribo	firma
sako	saco	suliĉa	suficiente
salo	sal	sukero	azúcar
salono	salón	suno	sol
saluti	saludar	super	sobre (sin tocar)
sana	sano, -a	supo	sopa
sango	sangre	supre	encima
sankta	santo, -a	supreniri	subir
sata	saciado, harto, -a	sur	sobre (tocando)
savi	salvar	surda	sordo, -a
scii	saber	Ŝajni	parecer
se	si	ŝerci	chancear
sed	pero, sino	ŝinko	jamón
segi	segar, serrar	ŝipo	barco, buque
seĝo	silla	ŝlosi	cerrar con llave
seka	seco, -a	ŝoveli	elevant con pala
sekso	sexo	ŝranko	armario
sekvi	seguir	ŝraŭbi	atornillar
semajno	semana	ŝtofo	tela, materi
sen	sin	ŝtono	pedra
senco	sentido	ŝtrumpo	media (vestido)
sendi	enviar	ŝtupo	escalón, peldaño
senŝerce	de veras, sin chanza	ŝuo	zapato
sent	sentir	Tablo	mesa
servi	servir	tagmezo	mediodia
severa	severo, -a	tago	dia
sezono	estación (del año)	takto	compás (música)
sidi	estar sentado	lamen	no obstante
signo	signo, señal	tapiŝo	tapete
ŝilenti	callarse	tas	taza
ŝilko	seda	t. e. (tio estas)	esto es
ŝinĵoro	señor	teatro	teatro
ŝitelo	botijo, garrafa	tegmento	tejado
ŝkatolo	caja	telero	plato
ŝkribi	escribir	temperaturo	temperatura
ŝocieto	sociedad	tempo	tiempo
ŝoifi	tener sed	teni	tener
ŝomero	verano, estio	terni	estornudar
ŝonĝo	sueño (soñar)	teo	tè
ŝorto	suerte, fortuna	tero	tierra
ŝovaĝa	salvage, silvestre	tia	tal
ŝpeco	especie	tial	por eso
ŝpegulo	espejo	tiam	entonces
ŝtari	estar en piè	tie	ahí, allí
ŝtrato	calle	tiel	así

timi	<i>temer</i>	vento	<i>viento</i>
tio	<i>eso, aquello</i>	ventro	<i>vientre, abdomen</i>
tiom	<i>tanto</i>	verda	<i>verde</i>
tiri	<i>tirar</i>	verki	{ <i>escribir obras literarias, musicales</i>
tiu ĉi	<i>este</i>		
tolo	<i>lienzo</i>	vero	<i>verdad</i>
tombo	<i>tumba</i>	verso	<i>verso</i>
tondi	<i>esquilar</i>	vespero	<i>tarde (parte del día)</i>
tondri	<i>tronar</i>	vesti	<i>vestir</i>
traduki	<i>traducir</i>	vesto	<i>vestido, traje</i>
tranĉi	<i>cortar</i>	vetero	<i>tiempo (que hace)</i>
trankvila	<i>tranquilo, -a</i>	veturi	<i>ir (en carruaje)</i>
tre	<i>muy</i>	viando	<i>carne</i>
trinki	<i>beber</i>	vidi	<i>ver</i>
tro	<i>demasiado</i>	vilaĝo	<i>villa, aldea</i>
trovi	<i>encontrar</i>	vinbero	<i>uva</i>
troviĝi	<i>encontrarse</i>	vino	<i>vino</i>
tualeto	<i>adorno en la persona</i>	vinthro	<i>invierno</i>
tuj	<i>enseguida</i>	viro	<i>varón</i>
tuko	<i>moquero (pañuelo)</i>	vitro	<i>vidrio</i>
tute	<i>totalmente, enteramente</i>	vivi	<i>vivir</i>
Ungo	<i>uña</i>	vizaĝo	<i>cara; rostro</i>
universo	<i>universo</i>	viziti	<i>visitar</i>
urbo	<i>ciudad</i>	voĉo	<i>voz</i>
utila	<i>útil</i>	vojo	<i>camino, ruta</i>
uzi	<i>usar</i>	voki	<i>llamar</i>
Vagono	<i>vagón</i>	voli	<i>querer</i>
vana	<i>vano-, a</i>	vortfarado	{ <i>formación de palabras</i>
varma	<i>caloroso, -a</i>	vorto	{ <i>voz, palabra, dicción</i>
yasta	<i>vasto, -a</i>		
vazo	<i>vaso, receptáculo</i>	vundi	<i>herir</i>
veki	<i>despertar</i>	Zorgi	<i>cuidar</i>
veluro	<i>terciopelo</i>	zumi	<i>zumbar</i>
vendi	<i>vender</i>		
veni	<i>venir</i>		

MONATOJ, TAGOJ: Januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro, decembro. — Lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo.

POPOLOJ, LANDOJ: Anglo, Aŭstro, Belgo, Bulgaro, Dano, Fino, Franco, Germano, Hispano, Hungaro, Italo, Norvego, Portugalgo, Ruso, Svedo, Turko. — Afriko, Ameriko, Azio, Aŭstralio, Eŭropo, Anglollando *aŭ* Anglujo k. t. p.

Verkaro de D^{ro} L. L. ZAMENHOF

Fundamentaj verkoj.

- Fundamento de Esperanto.** (Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercoj, Universala Vortaro), eldono kvinlingva.
Unu volumo in-16 (bindita) . . . Fr. 3 (broŝurita) . . . Fr. 2 •
- Lingvaj Respondoj.** aperintaj en « La Revuo ».
Unu volumo in-8, 32-paĝa. » 75
- Fundamenta Krestomatio.** (Ekzercoj, Fabeloj kaj Anekdotoj; Artikoloj pri Esperanto, Poesioj).
Unu volumo in-16, 400-paĝa (bindita). Fr. 4 (broŝurita). Fr. 3 50

Literaturo (tradukoj el diversaj aŭtoroj).

- Georgo Dandin.** komedio en tri aktoj de MOLIERE.
Unu volumo in-8, 51-paĝa. 1 20
- Hamleto.** tragedio en kvin aktoj de SHAKESPEARE.
Unu volumo in-16, 170-paĝa. 2 »
- Ifigenio en Taŭrido,** dramo en kvin aktoj de GETHE.
Unu volumo in-8, 108-paĝa 2 »
- Proverbaro Esperanta,** laŭ la verko « Frazeologio rusa-pola-franca-germana », de M. F. ZAMENHOF, (1232 proverboj).
Unu volumo in-8, 82-paĝa. 1 80
- La Rabistoj,** dramo en kvin aktoj de SCHILLER.
Unu volumo in-8, 144-paĝa 2 »
- La Revizoro,** komedio en kvin aktoj de N. V. GOGOL.
Unu volumo in-8, 100-paĝa 1 50
- La Virineto de Maro,** fabelo de ANDERSEN, kun ilustraĵoj de H. M. BRODIE. (Elirita el la Fundamenta Krestomatio.)
Unu volumo in-8, 42-paĝa. 1 50
- Marta,** rakonto de ELIZA ORZESZKO.
Unu volumo in-8, 237-paĝa. 3 50

Tradukoj el la Biblio.

- Genezo,** unua libro el « LA PENTATEŬKO ».
Unu volumo in-8, 122-paĝa 2 »
- Eliro,** dua libro el « LA PENTATEŬKO ».
Unu volumo in-8, 99-paĝa. 2 »
- Levidoj,** tria libro el « LA PENTATEŬKO ».
Unu volumo in-8, 71-paĝa. 2 »
- La Psalmaro,** dua libro el la « Poetika Libraro ».
Unu volumo in-8, 165-paĝa 2 50
- La Sentencoj de Salomono,** tria libro el la « Poetika Libraro ».
Unu volumo in-8, 60-paĝa. 1 50
- La Predikanto,** kvara libro el la « Poetika Libraro ».
Unu volumo in-8, 28-paĝa. 1 75

CEFAJ

NURESPERANTAJ GAZETOJ

La Revuo *Senutile estas paroli pri la utileco de la Esperanta literaturo por la rapida kaj regula disvolvigo kaj divastigo de nia lingvo.*

Por helpi tiun floradon, estis necese, ke ekzistu tute pure literatura gazeto donanta neeldonitajn verkojn de la plej bonaj jam multaj pure esperantaj aŭtoroj, kaj koniganta plie, la plej belajn literaturajn ĉefverkojn de ĉiuj landoj, tradukitajn esperanten, de plej fidindaj kaj lertaj esperantistaj verkistoj de la lando mem.

Tia gazeto ekzistas. Tio estas « La Revuo », fondita kaj direktata de la jaro 1906, de CARLO BOURLET, Profesoro ĉe la « Conservatoire National des Arts et Mèliers de Paris » kaj Prezidanto de la « Pariza Esperantista Grupo ».

Krom ĝia nepra utileco, kiun provas ĝia sukceso « La Revuo » havas altvaloran privilegion. Efektive, ĝi estas la sola, kiu enalkulas en sia efektiva Redaktorado, nian amatan de ĉiuj Majstron D^{ro} L. L. Zamenhof, kiu, ĉiumonate, konstante, aperigas en ĝi multsatatan artikolon.

Tial, « La Revuo » estas nun la plej legata kaj ŝatata revuo el la nuresperanta gazetaro, kaj kalkulas abonantojn, eĉ en la landoj la plej malproksimaj.

Grandformate kaj luksege eldonita ĝi entenas almenaŭ, 48 blankajn paĝojn da literatura teksto, kaj plie 16 ruzkolorajn paĝojn sur kiuj estas interesege felietono pri la movado esperanta, anoncoj, reklamoj, k. t. p.

La jara abonkosto estas en Francujo Fr. 6, kaj en la aliaj landoj Fr. 7. Numeroj aĉeteblaj : po Fr. 0,50 ĉe ĉiuj libristoj.

Specimenon senpage, oni petu al la Fermo Hachette & K^o, Paris.

Scienca Gazeto *Se « La Revuo » celas konigi la ĉiulandajn literaturojn kaj la plej famajn literaturistojn, « Scienca Gazeto » celas konigi la plej gravajn kaj novajn eltrovaĵojn kaj elpensajojn de la homa spirito. Ĝi, estas tre interesa vulgarigilo por la scienca kaj industria progreso. Ĝi povas esti komprenata de ĉiuj : eĉ de neleknikistoj kaj ne scienculoj. Verkita simple, klare, la novaj adeptoĵ ankau legos ĝin facile.*

« Scienca Gazeto » estas la oficiala organo de la potenca « Internacia Scienca Esperantista Asocio », kiu enalkulas en sia Patronaro multajn el la plej famaj sciencistoj el ĉiuj nacioj kaj fakoj. Tio provas la favoron kun kiu ĝi estas taksata eĉ de altranguloj.

La Esperantistoj do devas esti dankaj al ĝia Direktoro-Fondisto, S^{to} VERAX, verkinto de multaj sciencaj kaj teknikaj verkoj, ke li kreis tiun utilegan revuon. Dank' al ĝi la Esperantistoj povas fieri pri sia lingvo, tiu tiel montras ĝian taŭgecon tiom por la literaturaj verkoj, kiom por la precizaj sciencoj.

La jara abono de « Scienca Gazeto » kostas Fr. 7,50. Ĉiu abono komenciĝas la 1 de Januaro. Apartaj numeroj kostas Fr. 0,75.

Senpagan specimenon petu rekte al la Fermo Hachette & K^o.